

JUNAJ HOMOJ KAJ GRANDEGA INUNDO

Urs Keusch

Maltrankviligas nin klimata plivarmiĝado, globalaj katastrofoj de ĝis nun ne antaŭsentataj dimensioj. Precipe grandegaj ondoj kaj inundoj, dezertigado de tutaj bordre-gionoj kaj loĝteritorioj, oni antaŭkalkulas „centmilajn viktimojn“ (*raporto en TV*). Ili estas apokalipsaj prognozoj, kiuj estas antaŭsciigataj kun scienca malvarmsangeco. Sed mi metas al mi demandon: Kio estas tiuj inundoj kompare kun pli detruanta ondo: malheleca, demoneca, ĉion detruanta hodiaŭa mediuma diluvo en televido, radio, komputiloj, interreto, poŝtelefonoj, videoludoj ktp. Poluakvoj de la homa pensado kaj malbono enpenetras hodiaŭ en la domojn, eĉ en la infanajn ĉambrojn. La junaj homoj jam kiel infanoj, gvidataj per neestingebla instinkto de sia sciavideco, trinkas el superplenigita monda fekaĵputo kaj multaj el ili enfalas en la spiritan kaj animan malpurigon, kiun ili ne kapablas venki dum la tuta vivo, kaj tiel ili estas spirite kaj anime malsanaj.

Tiu ĉi inundo estas pli malbona, milfoje pli malbona, milfoje pli fatala, ol kiun ni antaŭtimas konsekvence de la globala plivarmiĝado. Kaj la ebleco ŝirmi nian junularon antaŭ tiu inundo estas ĉiam pli malgranda, ĉar la teknikaj rimedoj, kiujn la junularo havas por sia dispono, estas ĉiam pli rafinecaj kaj enrudigemaj. Ĉiam pli en nia mondo disvastiĝas la malbono: obsceneco, perversecio, demoneco sin puŝiĝas en ĉiujn vivsferojn. Ĉiutage estas niaj infanoj kaj junaj homoj inuditaj per makulantaj bildoj kaj informoj kaj elmontriĝantaj al miliono da tentoj. Ili ne plu povas eniri la straton kaj la vendejon, sen ke antaŭ iliaj okuloj ne aperus arogaj kaj sintrudemaj bildoj, kiuj ilin rekte enĉenigas.

La virtoj estas forfloritaj...

Dostojevskij enskribis sian taglibron: „En la periodo de granda paco malaperas

grandanimeco kaj sur ĝian lokon stariĝas cinikeco, indiferenteco, enuo kaj krom tio ankoraŭ malica moko... Oni povas aserti, ke longa paco igas la homojn senkompate-majn... Sociala supereco iras konstante pli al la flanko de tio, kio estas en la homo malbona kaj malmola – al riĉeco kaj al kapitalo. Honestecon kaj oferemon oni taksas en la unua tempo post la milito. Ju pli longe daŭras la paco, des pli malmulte la homoj interesiĝas pri tiuj belegaj kaj valoraj virtoj, kiuj estas forfloritaj, piedpremitaj kaj mortigitaj, kaj ĉion konkeras avido pri riĉeco kaj profito...”

Ĉu ne estas tio la situacio, precipe en niaj riĉaj landoj de Okcidento? Ni enpeniĝu pri tio! Ĉu ni ne perdis la lastan jardekon, kiun ni travivis post la milito, per „kurado al la profito“? Ni volas havi ĉion, kaj tion je perdo de honesteco, kiel konstatas Dostojevskij, malutile je proksimula amo kaj altruismo en ne lasta vico je malprofito de niaj infanoj. Eĉ la infanoj devas havi ĉion, „ili devas farti pli bone ol ni“, kaj tiel ili estas senkulpaĵ viktimoj de la grandega inundo de la malbono, kiuj enfluis en la akvojn de malbraveco, enuo, depresio, perdodelaspirito, infieroreco, malestimo al si, jes eĉ ĝis mepereigo.

Ĉar tio malpura, obscena, perversa, demoneca, destruktiva kaj brutala en filmoj, en mediumoj ŝtelas al infanoj, ŝtelas al la junaj homoj ĝojon pri la vivo kaj la belo, ĝojon pri mistero, ĝojon pri Dio. Tio forprenas de ili sopiron pri io granda, sopiron fari el la vivo ion belan, ion unikan, ion grandan. Detruo en ili miraklon de la amo, sopiron pri la pureco kaj pri la spirita ordo kaj pri la superrego de la instinktoj. „Nia junularo estas tiel agordita, ke ĝi nenie povas trovi indicojn de pli alta vivsenco“ (Dostojevskij). Tio, kion ni hodiaŭ nomas konsumo, konsumismo, kresto de la konsumado, al kiu ni tiel blinde fardonis sin, estas finfine nenio alia ol pli-

beligita esprimo por avideco, kiun sankta Paŭlo nomas radiko de ĉiu malbono. Estas ĝi mensogo, mesogo kaj tento, promeso de diablo, *kiu estas mesoganto kaj patro de la mensogo* (Joh 8,44).

Eĉ ne unu domaĉo sen televido...

Kompatinda junularo, kompatindaj infanoj, kiu vin en estonteco ŝirmos, kiu vin eligos el tiu ĉi inundo? Ĉu vi naskiĝados, por pereji en tiu ĉi inundo? Ne, tio ne darfas okazi. Sed rigardu: Ni mem estas tiel senpovaj. La ondoj de la malbono altiĝas ĉiam pli supren, ĉion ili deprenas per granda forto antaŭ la vizaĝo de la mondo, ili uzurpas eĉ la lastajn malriĉulajn domaĉojn en foraj teritorioj de Afriko... En tiuj domaĉoj estas televido aŭ video, interreto, poŝtelefono kaj videoludoj. Kia ĝi estas revolucio de la spirito de malpacemo kaj aroganteco, egoismo, malĉasteco, de la malamiko de la kvieto, preĝo, estimo kaj amo. Tiel konstruas Antikristo en „infera rapideco“ sian mondon. Ĉion en la nomo de la globala komunikado, kleriĝo, scio... De kia kleriĝo, de kia scio? Ĉu scio pri Kristo, nia Savinto? Ĉu scio pri nia ĉiela Patro? Ĉu scio pri beleco de la kreitaro, pere de kiu Li alparolas nin? Ĉu scio pri pli bona homo, kiu estas en ni kaj kiu danke al la graco puvus en ni disvolviĝi? Ĉu scio pri pasemeco de tiu ĉi vivo, scio pri la eterna vivo, scio pri la virtoj kaj pri tio, ke sen la amo al Dio, sen vera homa amo la mondo ŝanĝiĝas je infero? Ne. En la infanajn ĉambrojn kaj familiojn hodiaŭ enpenetras mondo sen Kristo ankaŭ en tiujn la plej forajn domaĉojn de la malriĉuloj. Ĝi estas la mondo de Antikristo. Ĝi estas malvarma, senkompata, elradikiĝinta mondo. Ĝi estas la mondo, pri kiu diris Jesuo Kristo: *Se ne estus tiuj tagoj mallongigitaj, neniu estus savita* (Mk 13,20).

„Jes, mi baldaŭ venos!“

Ĉar ni vivas en la tagoj de la lasta tempo, venas renkonten al ni Jesuo kun sia Mizerikordo. Kiel resurektinta Kristo li ape-

ris al Faustyna: „Pli frue ol mi venos kiel justa juĝisto, mi malfermas la pordon de la mizerikordo“ (*Taglibro 351*). Tio estas signo de fino de la tempoj. Li estas Venkinto. Li je la fino venkos. Li permesos al la malbono nur tial tiom da povo, por ke Li la regnon de la malbono detruu per ankoraŭ pli granda forto, por ankoraŭ pli grandigi ĝian falon kaj ĝian konsterniĝon. Ĉar diablo ne kredas je mizerikordo. Li ne kredas, ke Kristo ankoraŭ foje prenos la manojn de milionoj kaj milionoj da infanoj kaj junularo, por ilin elŝiri el la inundo, por ilin lavi per sia sango kaj vestigi al ili puran veston de la venko kaj ĝojo. Diablo kredas nur je „justeco, je la malvarma kaj senkompata „justeco“.

Tial nin Kristo petas, ke ni petu pri la mizerikordo por la mondo: por ke Kristo kiel Venkinto kontraŭ la malbono ekiru renkonten, por ke Dio kaj Patro de la mizerikordo al ni donacu en la Sankta Spirito sian pardonon, por ke venu Kristo, kiu videbliĝis al la mondo, kiu donadas al ĉiu melheleco de la mondo ekbrili al la radioj de sia Mizerikordo kaj donas al la homoj, por ke ili en Li ekkonu veran ĝojon, veran feliĉegon, veran vivon.

“Ankoraŭ pli frue, ol mi venos kiel justa Juĝisto, mi venos kiel Reĝo de la mizerikordo. Antaŭ ol venos tago de la justeco, estos al la homoj donita surĉiela tiu ĉi signo:

Ĉiu lumo sur la ĉielo mallumiĝos kaj sur la tuta tero estos granda mallumeco. Poste aperos la signo de la Kruco kaj el ĝiaj aperturoj, kie estis alnajligitaj manoj kaj piedoj de la Savinto, torentos granda lumo, kiu por longa tempo eklumigos la teron. Tio okazos mallonge antaŭ la lasta tago.” (*Taglibro 42*).

„Rigardu la larmojn de la malgrandaj infanoj!“

Fratulino Faustyna foje preĝis: „Mizerikorda Jesuo, je la propeto de viaj sanktuloj kaj precipe je la propeto de via kara Patrino, kiu Vin edukadis kiel Infanon, mi petas Vin,

benu mian patrujon. Ne rigardu, Jesuo, niajn pekojn, sed rigardu la larmojn de viaj malgrandaj infanoj, ilian malsaton kaj malvarmon, pro kiuj ili suferas. Jesuo, donu al mi pro tiuj senkulpuloj tiujn gracojn, pri kiuj mi Vin por mia patrujo petas.“ – Tiumomente mi ekvidis Jesuon kun la larmoj en la okuloj. Li diris al mi: „Rigardu, mia filino, kiel multe mi pro ili suferas. Sciu, ke ili portas la mondon.“

„Sciu, ke ili portas la mondon“

Ni petu plenfide: Venu, Jesuo, venu! Venu antaŭ ĉio pro la infanoj. Donu, ke surĉiele aperu signo de la Kruco, donu ekbrili al la lumo en niaj tenebroj, por ke multaj homoj revenu al Vi kiel al sia vera Savinto, kiel al sia Vivo kaj Ĝojo. Kompatu nin, kompatu nin prefere pro niaj senkulpaj infanoj... Amen. ■

-sks- 15/2007